

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 5

Novembro/Decembro 1966

Brila jubilea jarkunveno de GEFA

En Uelzen renkontiĝis 100 esperantistoj el 4 landoj

La 10a jarkunveno de la Germana Esperanta Fervoja Asocio (GEFA) okazinta de la 15a ĝis la 16a de oktobro 1966 pasis sukcesplena. Niaj asocioj kun gastoj el Danlando, Francio kaj Nederlando travivis denove du agrablajn tagojn en la nordgermana urbeto Uelzen.

Spite al ioma nebulo favoris tiun semajnfinan renkontiĝon la aŭtuna suno, kiam sabaton alvenis la plej multaj en la insulstacidomo Uelzen. Bone markita akceptejo atendis nin kaj zorgeme preparita kuverto kun la kutimaj dokumentoj, prospektoj kaj kelkaj donacoj afable disponigitaj de fervojista asekuro. Kun plezuro estis konstabebla laŭ la adresaro, ke la intereso ĵus pri tiu jarkunveno ne regresis malgraŭ la baldaŭa IFEF-kongreso en Fulda. En la hotelo „Deutsche Eiche“ atentigis ampleksa ekspozicio de esperantaĵoj inkluzive Esperanto-poŝtmarkojn pri la signifo de la Internacia Lingvo. Antaŭ speciala ĝiceto de la poŝto formiĝis longa vico de interesuloj, kiuj stampigis siajn sendaĵojn. Literaturamantoj trovis kaj — laŭdire — ankaŭ aĉetis en sufiĉa kvanto librojn ĉe speciala stando de la Germana Esperanto-Asocio. Por kompletigi tiun bildon estu menciante, ke elstaraj personoj el la fervoja kulturorganizo, el la sindikatoj, el la Esperanto-movado kaj el la publiko vivo partoprenis la aranĝojn.

Gazetara konferenco

Kiel kutime antaŭiris vendredon, la 13an, konferenco kun ĵurnalisto de la loka gazeto kaj kompetentulo de la fervoja direkcio Hannover, kaj kiel kutime evidentiĝis la valoro de konversacio en



Antaŭ la ekspozicio en la kongresejo

tia rondo. Eble kelkiu anticipa miskompreno kaj malĝusta interpretado foriĝis. La ampleksaj raportoj en la gazetoj „Soltauener Kreiszeitung“ kaj „Allgemeine Zeitung der Lüneburger Heide“ estis tre favoraj. La ĉi lasta gazeto eĉ presigis la titolbildon de la BULTENO. Cetero la loĝantaro estis informita pri la jarkunveno ankaŭ per artikolo en la loka informilo „Ulenspiegel“.

Laborkunsido de LKK

Dum la antaŭaj jarkunvenoj la estraro de GEFA preparolis problemojn de la propra organizo. Tiu kunsido (14. 10.) kontraŭe estis karakterizita per la neceso pluokupiĝi pri la venonta IFEF-kongreso en Fulda. S-ro Rummel, reprezentanto

de la fervojista kulturorganizo, informiĝis pri la stato de la ĝisnunaj preparlaboroj. Diversaj programeroj ankoraŭ ne estas definitivaj kaj aperos ne jam en la provizora programo. Intertempe pretiĝis la aliĝiloj, kaj la unuaj kongresanoj jam estas registritaj. Kiel atentaj observantaj partoprenis, post kelkjara paŭzo, la bonvenigita IFEF-prezidanto de Jong kaj la honora IFEF-membro Lok, ambaŭ el Nederlando.

Pretaj por novaj taskoj

La salonego de la posttagmeza kunveno (14. 10.) estis preskaŭ tro malgranda por akcepti ĉiujn reprezentantojn de la GEFA-estraro kaj la distriktkomisiitojn. GEFA-prezidanto Gießner bonvenigis la ĉestantojn kaj salutis aparte la novedzigitan paron Schmid. Li donis superrigardon pri la stagnanta membronombro kaj atentigis pri la komencita varbkampanjo. Intertempe jam alvenis la unuaj aliĝoj. Certe ankaŭ la gajnotaj premioj esperigas superi la nekontentigan staton. Por la novaj GEFA-anoj ofertas sin kiel favora okazo la baldaŭa IFEF-kongreso en Fulda.

Post kiam la konsisto de la GEFA-estraro ne ŝanĝiĝis dum 10 jaroj, necesis trovi nun posteulon por la eksigonta redaktoro Barnickel. S-ro Graß el Solingen deklaris sin preta transpreni tiun oficon kaj ankaŭ fariĝi IFEF-komitatano ekde la venonta periodo, dum s-ro Brandenburg el Münster kunlaboros en la fakprelegaj aferoj. La distriktkomisiitoj konsentis principe disponigi sin kaj aliajn gekolegojn por fiksitaĵoj dum la IFEF-kongreso. Estas ĝojige, ke la apelacio trovis tian pozitivan ĉhon.

Pluaj objektoj de la vigla diskutado estis la reformigo de la Germana Esperanto-Instituto kaj la aktivigo interne de la internacia fervojista kulturorganizo FISAIC. En 1967 ne okazos jarkunveno, sed laborkunsido de la GEFA-estraro kun la distriktkomisiitoj en ankoraŭ ne fiksita urbo. Por 1968 Augsburg estas antaŭvidita kiel urbo de la 11a jarkunveno.

Salutvespero en la signo de bonvolo

Sabatvespere (14. 10.), post komuna vespermanĝo kun abunda malvarma plado, kolektiĝis en la kongresejo proks. 150 GEFA-anoj kaj gastoj. S-ro Heimlich, la komisiito por Esperanto en la fervoja distrikto Hannover kaj samtempe organizanto de la jarkunveno, malfermis la vesperon. GEFA-prezidanto Gießner esprimis sian ĝojon pri la relative multnombraj partoprenantoj kaj eminentaj gastoj, kiujn ĉiujn li salutis tutkore. Ĉi tiuj siaflanke direktis tre afablajn salutojn al la ĉestantaro observante grandparte la deziron de la Esperantistoj alparoli ilin en la internacia lingvo.

Eble ili ne tute fidis al sia lingva kapableco, sed laŭ la aplaŭdo estis konstateble, ke ankaŭ neesperantistaj eminentuloj sciis bone elprononci. Parolis:

s-ro Stautz, reprezentanto de la Socialorganizo en la fervoja distrikto Hannover,
s-ro Rummel, reprezentanto de la ĉefestraro de la Fervoja Socialorganizo en Frankfurt,
s-ro Drechsler, estro de la regiona distrikto Uelzen,
s-ro Bebensee, estro de la komunumo Veerssen,
s-ro Schalmey, estrarano de la fervojista sindikato GdED,
s-ro Hampe, reprezentanto de la fervojista sindikato GDBA,
s-ro Piontek, reprezentanto de la fervojista sindikato GdL,
s-ro de Jong, prezidanto de IFEF,
s-ro Kruse, prezidanto de la Dana Esperanta Fervojista Asocio,
s-ro Bernier, estrarano de la Franca Esperantista Fervojista Asocio,
s-ro Lok, reprezentanto de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda,
s-ro d-ro Bormann, vicprezidanto de GEA.

Pro spacomanko ne povas esti citataj ĉiuj alparoloj demonstrantaj la estimon kaj bonvolon al GEFA kaj Esperanto. Tamen estu menciataj kelkaj frazoj de la IFEF-prezidanto de Jong:

„La kunveno, en kiu regas tiu amikeco, en kiu regas tiu bona volo kaj la bona laboro, estas la jarkunveno de GEFA. GEFA estas kvazaŭ perlo en nia internacia movado. Mi multe ĝojas, ke la rilatoj kun GEFA ĉiam estas harmoniaj kaj bonaj“.

La GEFA-prezidanto rememoriginte pri la mortintoj, s-roj Hund kaj Elsbach donis resumon el la jarraporto, kies kompleta teksto estas jena:

La kunvenloko por ĉi tiu jubilea loka jarkunveno estas la nordgermana urbeto Uelzen, situanta enmeze de vastaj arbaroj kaj proksime al la restoj de la iam grandegaj erikejo-ebenaĵoj de la Luneburga Eriko. Kiam la GEFA-estraro aranĝis en 1957 la unuan jarkunvenon en Fulda, oni ne sciis, ĉu nia membraro akceptus la novan ideon. Ni ne sciis, ĉu sekvus dua, tria jarkunvenoj. Sed ni esperis tion. Kaj la esperoj realiĝis. De jaro al jaro ĉiuj kolegoj pli ekŝatis la kunvenojn; jam de kelkaj jaroj eĉ niaj eksterlandaj geamikoj regule vizitis niajn jarkunvenojn, kiujn ni klopodis fari allogaj ankaŭ por ili. Estas memkompreneble, ke ni speciale ĝojas pri tiu fakto kaj ĉiam alte taksis la honoron povi saluti ankaŭ estraranojn de IFEF, de aliaj landaj asocioj kaj de niaj germanaj Esperanto-fratorganizoj. Same ĝojiga estas la konstato, ke en la lastaj jaroj ankaŭ la kreskanta intereso de niaj fervojistaj sindikatoj montriĝis en tio, ke ili sendis reprezentantojn de siaj regionaj aŭ eĉ ĉefaj estraroj al niaj jarkunvenoj.

Trafoliumante la ĝismunajn jarraportojn oni vole-nevole kaj sen memlaŭdo devas konfesi, ke la Germana Esperanta Fervojista Asocio sub la gvidado de sia estraro, kiu ne ŝanĝiĝis dum tiuj dek jaroj, ne nur starigis, sed ankaŭ plenumis abundan programon de ideoj kaj taskoj. Oni same povas konstati, ke en la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio ĝi akiris kontentigan pozicion, kiu ne bazas sur sia laŭmembra forteco, sed sur siaj objektivaj ideoj kaj konstruktivaj laborometodoj. Tio jam kelkfoje estas atestita el la buŝo de kompentuloj. La tasko de tia jarraporto nek povas esti resumi la planitan kaj la atingitan nek estas sufiĉe da loko por tio. Por dokumenti tion, oni pli bone kompletigu iun tagon la historian superrigardon pri la evoluo de nia Asocio aperinta en GEFA-Bulteno n-ro 7 de decembro 1961. Restas momente nur diri, ke ni klopodos daŭrigi nian vojon laŭ samaj manieroj kaj dinamiko, kvankam tute certe la estraro ne denove povos elteni 10 jarojn en la nuna konsisto.

La granda tasko, kiu okupas la estraron kaj kelkajn bonvolajn helpantojn jam de unu jaro, estas la preparado de la 19a IFEF-kongreso okazonta en majo 1967 en Fulda. Ĝi kaŭzas, ke ni ne disponas pri la fortaj kaj tempo, kiuj estas necesaj por festi nian 10an jarkunvenon tiom dece kaj brile kiom ni volonte dezirus. Ni konsolu nin mem konsciante, ke la kongresaj preparlaboroj bonorde marŝas kaj ke la kongreso en Fulda signifos unu el la kulminojn en ĉi tiu dekjara evoludo, tiamaniere substrekante la valoron de la hodiaŭa jarkunveno. Minimume ni tion esperas. Sekvu nun diversaj raporteroj kiel kutime.

En la asocia organizformo ŝanĝis menio. Ĉiuj kunlaborantoj en la distriktoj fidele restis en siaj oficoj.

Multaj membroj kaj GEFA kiel organizaĵo efike kontribuis al la bonega rezulto de la **subskribkolektado** favore al enkonduko de Esperanto en la lernejojn (komp. lastjaran jarraporton). Subskribis intertempe ankaŭ la ĉefurbestro de la kongresurbo Fulda, samtempe prezidanto de la „Unuiĝo de germanaj urboj“ (Deutscher Städtetag). Raportis speciale pri tiu temo i. a. la revuo „Der Bundesbahn-Inspektor“ kaj „Die Bundesbahn“ same kiel multaj tagjurnaloj.

Ankaŭ ĉi-jare ni povis esti kontentaj pri la eĥo, kiun trovis nia laboro en **gazetaro kaj revuoj**. La nombro de artikoloj en fakaj kaj sindikataj revuoj kreskis, tiel pli precize kaj komplete informante la fervojistaron ĉiŝupcan kaj per la ĉiutaga gazetaro pli vastajn popolamasojn. Jen kelkaj el la fervojaj kaj sindikataj revuoj, kiuj parte plurlingve publikigis artikolojn de ni aŭ pri ni ĉiam favorajn: Deutsche Bundesbahn, Rad und Schiene, Bundesbahn-Mitteilungen, Sozialblatt, Sozialzeitung Hannover, Der Bundesbahn-Inspektor, Der deutsche Eisenbahner, Der deutsche Bundesbahnbeamte, Signal, Eisenbahntechnische Praxis.

Preĉipe la kontaktoj kun Sozialblatt (eldonkvanto: pli ol 300000) konsiderinde plintensiviĝis.

Ankaŭ la **Dokumenta Servo** de la Germana Federacia Fervojto denove enigigis en siajn kolektaĵojn la fakprelegojn faritajn en Utrecht kaj dum la UK en Budapeŝto.

Gravega rezulto de longjaraj klopodoj kaj neimageble streĉa laborado de malmultaj unuopuloj prezentiĝis en majo 1966 en formo de belaspakta libreto, nome la **Terminareto** Germana-Esperanto kaj Esperanto-Germana. Ĝi enhavas 2000 terminojn el fervojaj medioj kaj preferas estas destinita por la germanlingva tereno en Eŭropo. Tamen jam evidentiĝis, ke ankaŭ landaj IFEF-asocioj kun aliaj naciaj lingvoj decidis eluzi ĉi tiun terminareton por kompili similan vortaron en siaj propraj lingvoj. La financigo estas faciligita helpe de BSW (Fervoja Kulturorganizo), kiu disponigis monpruntajn kaj flanko de IFEF, kiu donacis 400 guldenojn kaj eble ankoraŭfoje saman sumon donos, bonvena kaj respektinda helpo. Restas al ni la espero, ke la tuta kvanto de 1000 ekzempleroj forvendigos. Pro tio ĉiu aŭdanto kaj leganto de ĉi tiu jarraporto estas petata aĉeti almenaŭ unu terminareton, kiu ankaŭ estas tre taŭga kiel donaco. La Terminara Komisiono de IFEF en Utrecht decidis, ke oni daŭrigos la laborojn pri pli kompleta vortaro laŭbaze de la UIC-terminaro, superhoma streĉado. Mi finu ĉi tiun punkton dankante el profunda koro al la kunlaborintaj de nia terminareto, unuavice al ĝia verkinto Gernot Ritterspach.

Tamen ne ĉiam la ĉielo estas blua. Pro tio mi ankaŭ devas mencii la malĝojigan fakton, ke la ĉefadministracio de la Germana Federacia Fervojto elprenigis la esperantlingvan **horarŝlosilon** kaj la porpasaĝerajn klarigojn el la konata horareto por longdistancaj trajnoj (Reisefernfahrplan). La oficiala kaŭzigo estis „manko de spaco“. Bedaŭrinde, ke tio okazis post 12 jara aperado, des pli bedaŭrinda, ĉar la RFF-kajeretoj preferas estas uzataj de eksterlandanoj. Jam venis plendoj al la eldonanta instanco kaj al ni, kiuj tamen ĝis nun ne sukcesis ŝanĝi la sintenadon de la DB. En la kompleta „Oficiala horaro“ (Amtliches Kursbuch) la horarŝlosilo en Esperanto restis aperanta.

En la lastjaraj jarraportoj kelkfoje estas menciita la **centra biblioteko** de GEFA. Ĝi ricevis novajn volumojn kaj konstante evoluas. Dezirinde estus, ke la membraro ankoraŭ pli abunde eluzus ĝin.

Pri nia **kunagado** en IFEF mi elektas jenajn punktojn:

- GEFA daŭrigis kunlabori en la traktado de la **IFEF-regularoj** akceptitaj de la kongreso en Utrecht. Estis tre temporaba okupado, tamen necesa.
- En la 18a **IFEF-kongreso** ĉeestis 78 germanoj. Bonega impresio, ke la ĉefadministracio sendis oficialan reprezentanton en la persono de fervoja direktoro Kirn, ĝenerala reprezentanto de la Germana Federacia Fervojto en Nederlando. Ankaŭ la ĉefestraro de l'Sindikato de germanaj fervojistoj (GdED) delegis ĉefestraron al la kongreso, nome s-anon Schalmey.
- Grava rezulto de la 18a kongreso estis, ke IFEF aliĝas al UEA kiel „kunlaboranta faka asocio“, decido kiu kontribuis al la koncentriĝo de la Esperanto-movado ĝenerale.
- Konsiderinda nombro de germanaj kolegoj ĉeestis en la **51a Universala Kongreso** en Budapeŝto. Tie ili partoprenis en faka ekskurso, dum kiu oni povis fari tre interesajn studojn en fervoja mezurvargono. Krome okazis altnivela faka prelego flanke de la direktoro de la hungara fervoja muzeo kaj posta radia intervjuo kun la prezidantoj de IFEF kaj GEFA.

Membrostato

Ĉi tiu raporto ne finiĝu, sen ke gravega problemo estas tuŝata. Ĉiu el niaj membroj povis legi en „Bulteno“ artikolon pri la zorgoj, kiujn kaŭzas la evoluo de la membrostato. Konjektante ke ĉiuj el vi kaj nia tuta membraro ne deziras regreson de nia asocio, la GEFA-estraro esperplene atendas vian helpon, vian kunagadon celantan la plialtigon de nia membronombro. Bonvolu konsideri, ke ja la estraro povas gvidi, konsili, multo labori, sed tian problemon ĝi ne povas solvi sen la aktiva kunhelpo de ĉiuj. Atente studu la Bultenon kaj ekagu. Nepre ekagu, baldaŭ, hodiaŭ, tuj!!! Ĉies agado estos decida. Eluzu la favoran fakton, ke la 19a IFEF-kongreso okazos en Germanio. Helpu ankaŭ vi, ke multaj novuloj aliĝos al tiu kongreso.

Ni do finu per la konstato, ke la okkapa LKK faris kaj faros sian plej bonan, por arangi decan kaj alugan kongreson en la belega barokstila urbo Fulda. Por ĉies goston la programo taŭgos. Malnovaj kaj novaj esperantistoj trovos kontaktojn kaj amikojn, goĝojn kaj kontenton. Venu multnombro al Fulda! Instigu viajn konatojn, faru la 19an IFEF-kongreson sukcesa! Faru ĝin neforgesbla mejloŝtono inter la fino de la unua jardeko de niaj jarkunvenoj kaj la komenco de la dua jardeko. Faru ĝin esperiga evento de la esperantistaro fervojista kaj impresiga manifestacio de nia faka movado por ĉies okuloj.

La dua parto de la vespero estis dediĉata al la dancado laŭ gajaj melodioj de la fervojista orkestro Heinz Neuber. Tiu senĝena kuneŝtado, babilado kaj amuzado ankaŭ apartenas al la jarkunveno. Ĝi fortigas la amikajn rilatojn. Ne mirinde ke je la antaŭvidita tempo kelkaj ankoraŭ ne ŝatis disiri.

Matineo de kulturaj prezentadoj

Filmoj, teatraĵo kaj prelego regis la dimanĉon. Kolora sonfilmo disponigita de la Germana Federacia Fervojo kondukis la spektantojn al famaj lokoj laŭlonge de la Romantika Strato. Jen Rothenburg, la unika mezepoka urbeto en Bavario, kien vojaĝos la kongresanaro venontjare. Allogaj la aliaj urboj kaj vilaĝoj kun sia miljara raveco! Certe la deziro esti tie dum la venonta majo manifestiĝis.

Kiel bone taŭgas Esperanto ankaŭ sur la sceno, pravis la asambleo de laikaj aktoroj el Hamburg prezentanta la komedion „Mina Magdalena“ de Curt Goetz. Tiu humorplena aŭtoro konas la facilaniman prijuĝon de la homoj. Sed ĉia misinterpretado fine trovas sian feliĉan elirvojon. La geaktoroj Elsbeth Wilgus, Elke Kühnel, Hans Schütt kaj Georg Dahl ludis konvinke, la spritaj dialogoj preskaŭ ne necesigis la suflorinon. Feliĉe, ke inter la germanaj esperantistoj troviĝas tiaj kapablaj amatoroj.



Teatra prezentado

La sopiron pri Azio vekis prelego kun dia-pozitivaj de s-ro Heinz Schindler el Schwelm. Li estis la unusola membro de GEFA, kiu partoprenis la lastjaran Universalan Kongreson de Esperanto en Tokio. Sendube li kolektis sennombrajn impresojn kaj spertojn. Liaj interesoj direktis sin ne nur al templaj aŭ ekzotikaj artaĵoj, li fotis kaj komentariis ankaŭ fervojajn instalaĵojn. Certe kelkiu bedaŭris ne ankaŭ esti vizitinda kun li Japanion kaj Koreon. Domaĝe, ke la limigita tempo ne permesis detale rakonti.

GEFA-prezidanto Gießner ankoraŭfoje dankis al gesinjoroj Heimlich, kiuj tiel streĉe kaj modele prizorgis la aranĝojn, antaŭ ol kolektiĝis la kongresanoj por la komuna tagmanĝo en digna kadro. Tiuĵ, kiuj havis posttagmeze tempon, rigardis aliajn fervojajn filmojn.

Ekskurso al la erikeja regiono

Sen la tradicia rondvojaĝo la kongresprogramo estus estinta malkompleta. Dufoje akceptis ruĝo fervoja aŭtobuso la vojaĝemulojn (14. 10.) kaj kondukis ilin tra fekunda regiono al la iama abatejo Ebsdorf. Estas juvelo de la gotika konstrustilo, kie post la likvido de la benedikтина ordeno protestantaj filinoj el iam feŭdaj familioj flegas kulturon kaj tradicion. Kia trankvilo regis en la klostroj, malproksimaj estis ĉiutaga hasteco kaj motorbruado. Kiel simpla aperis al niaj antaŭuloj la mondo designita sur granda, konservita mapo! La ĉirkaŭaĵo de Uelzen estas karakterizata per la agrikulturo favorita de fruktedona tero. Agrikultura lernejo, sukerfabriko, plantejoj, herbejoj, bienoj destinas la vizaĝon de tiu regiono, sed ankaŭ erikejoj kaj mirindaj arbaroj.

Al fervojaj interesuloj estis donita la okazo viziti en la stacio de Uelzen unu el la plej modernaj regadejoj en Germanio. La vicstaciestro donis klarigojn, dum sur la relarskemo ruĝaj aŭ flavaj lumstrioj signis la rulantajn trajnojn aŭ lokomotivojn. 30 fervojistoj estis anstataŭitaj per la elektrona instalaĵo.

Dankon precipe al la organizintoj, ges-roj Heimlich, dankon al la fidela GEFA-membraro, kaj al ĉiuj aliaj ni diru: ĝis revido venontjare en Fulda!

W.B.

Zum 10. Mal

Am 14./15. Oktober 1966 war Uelzen Treffpunkt von 100 Eisenbahner-Esperantisten, darunter Gästen aus Dänemark, Frankreich und den Niederlanden.

Die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahnsozialwerk hielt nach dem Krieg ihre 10. Jahresversammlung ab, die Herr Heimlich (Soltan), Beauftragter für Esperanto im BD-Bezirk Hannover, in vorbildlicher Weise ausrichtete. Am Festabend konnte Herr Gießner, Vorsitzender der Vereinigung, wieder zahlreiche Persönlichkeiten des BSW, der Gewerkschaften sowie des öffentlichen Lebens begrüßen. Leider hatte die zuständige BD Hannover entgegen dem bisherigen Brauch keinen Vertreter entsandt. Die Ehrengäste fanden lobende Worte für die Arbeit der Eisenbahner-Esperantisten, die laufend

die Verständigung zwischen Kollegen verschiedenster Sprachengebiete praktizieren. Für die weitere Arbeit insbesondere für die nächstjährigen internationalen Kongress wurde Unterstützung zugesagt. Besonderen Beifall brachten die Ausführungen des Herrn de Jong (Amsterdam), Präsident des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten. Das Treffen wurde von der örtlichen Presse positiv gewürdigt.

Die Arbeitssitzungen standen im Zeichen des näher-rückenden internationalen Kongresses in Fulda. Erfreulicherweise erklärten sich eine Reihe von Sprachfreunden bereit, während des Kongresses zeitlich begrenzte Aufgaben zu übernehmen. Außerdem standen aktuelle Fragen der Mitgliederwerbung und allgemeine Organisationsangelegenheiten zur Debatte.

Obwohl eine besondere Heraushebung dieses Jubiläumstreffens nicht beabsichtigt war, erhielt es doch eine besondere Note durch eine Ausstellung von Esperanto-Drucksachen und -briefmarken. Philatelisten machten von dem Sonderstempel eifrig Gebrauch, und Literaturfreunde deckten sich auf einem Verkaufstand mit Esperanto-Büchern ein. Über die nicht geringen Leistungen der Vereinigung im vergangenen Jahr erteilte ein Jahresbericht ausführlich Auskunft.

Der Sonntagvormittag stand im Zeichen kultureller Veranstaltungen. Ein DB-Tonfilm „Die Romantische Straße“ gab einen Einblick in das Ausflugsgebiet, das auf dem nächstjährigen internationalen Kongress besucht werden wird. Daß Esperanto auch auf der Bühne seine Wirkung nicht verfehlt, bewies eine Laienspielgruppe aus Hamburg, die das Lustspiel „Minna Magdalena“ von Curt Goetz in einer gelungenen und mit viel Beifall bedachten Aufführung bot. Sprachfreund Schindler (Schwelm) zeigte seine reiche Ausbeute an Ostasien-Dias. Er hatte im August 1965 als einziger deutscher Eisenbahner-Esperantist am Universalen Esperanto-Kongress in Tokio teilgenommen.

Das sonnige Herbstwetter verleitete verständlicherweise zu einem Omnibusausflug in die nähere von der Landwirtschaft bestimmte Umgebung. Ziel war das

ehrwürdige Kloster Ebsdorf. Betrieblich Interessierte konnten unter sachkundiger Führung das neue Zentralstellwerk von Uelzen besichtigen. Bei gemeinsamen Mahlzeiten und einem Tanzabend wurde auch die Geselligkeit gepflegt, so daß dieses Wochenende viel zu schnell verging und den Wunsch bestärkte, am 19. IFEF-Kongress in Fulda dabei zu sein.

Noch einmal: Dank den Veranstalter und auf Wiedersehen im Mai 1967!

W.B.

Ultrasono kaj komputilo

Antaŭ nelonge alvenis en la haveno de Hamburg specialvagono el Usono. La Societo por Elektrofiziko instaligos en la fervojvagono, 22,5 m longa kaj 40 t peza, mezurilojn kaj komputilon. La valoro de tiu vagono estos post la enkonstruo 3 ĝis 4 milionojn da markoj. La nova ultrasono-mezurilvagono estos veturigata sur la eŭropa relaro kun meza rapideco inter 60 kaj 70 km pohore. Ĝi estos uzata precipe sur tiuj relvojoj, kie rapideco de 200 km pohore estas permesita. La instalita komputilo liveros kontraŭe al la ĝisnuna metodo tuj post la transpreno de la indikoj ankaŭ la rezultatojn.

(Laŭ „Der Deutsche Eisenbahner“, organo de la GdED)

19. IFEF-Kongress

Die November-Ausgabe des Verbandsorgans „La Internacia Fervojisto“ enthält Programm und Anmeldevordrucke. Bitte, melden Sie sich und evtl. Ihre Familienangehörigen möglichst bald an! Wer an der Teilnahme verhindert ist, unterstütze den Kongress durch seine Anmeldung als Sympatisierender (8,— DM)!

19. IFEF-Kongress, Postfach 700746,
6 Frankfurt (Main) 70



Vizito al la centra regardejo en la stacio Uelzen

Du literoj signis depost kvin jaroj kaj signas en ĉi tiu eldono lastfoje la artikolojn, kiuj venis el la plumo de la redaktoro. Li transdonis tiun oficon pro devigaj kaŭzoj al alia kolego. BULTENO, modesta laŭ aspekto kaj eldonkvanto, tamen ĉie ŝtata inter mi gekolegoj, daŭrigos sian taskon sambone kiel jam dum 15 jaroj. Dankante sincere al ĉiuj legantoj kaj kunlaborantoj adiaŭas la redaktoro.

W.B.

Nova redaktoro

Ekde januaro 1967 BULTENO estos redaktata de „s-ro Wilhelm Grass, D-565 Solingen-Ohlgs, Meteorstr. 18“.

Ni petas ĉiujn kunlaborantojn kaj eksterlandajn redaktorojn, direkti siajn kontribuojn, informojn aŭ eldonaĵojn nur al la adreso de la nova redaktoro.

Germana Esperanta Fervojista Asocio
Estraro

Diversaĵoj

Aŭstrio. De la 11a ĝis la 18a resp. de la 18a ĝis la 25a de februaro 1967 okazos la 6a kaj 7a internaciaj fervojistaj esperanto-skemajnoj en Krimml kiel lastjare, kiu estas atingebla per trajno aŭ aŭtomobilo de Zell am See (inter Salzburg kaj Innsbruck). Loĝigo en la feria domo „Marienhof“ apud la stacidomo. Kompleta unusemajna restado kostas proks. 650 aŭstrajn ŝilingojn ekskluzive la kostonj por la skiflito. Pluajn informojn donas „s-ro Günther Doliwa, 3031 Cordingen, n-ro 16“ aŭ la organizanto „s-ro Johann Geroldinger, Marcusingang 7, A-4020 Linz (Donau), Aŭstrio“.

Finlando. La „Internacia Fervojista Kontraŭalkohola Asocio (IEAV)“ aranĝos sian kongreson de la 12a ĝis la 20a de junio 1967 en Järvenpää, 37 km norde de Helsinko. Krom la kunvenoj kaj solenaĵoj, ankaŭ aparte por esperantistaj membroj de tiu organizo, okazos tuttagaj ekskursoj per trajnoj, aŭtobusoj kaj ŝipoj diversdirekten. La kongreskotizo inkluzive loĝejon, manĝojn, ekskursojn varias inter 320 finnaj markoj (por unuflita ĉambro) kaj 140 finnaj markoj por amasloĝejoj. Post kongresfino oni antaŭvidas rondo-vojaĝojn en Finnlando per fervojo aŭ aviadilo ĝis Laplando aŭ grupvojaĝojn (1—4 tagoj) al Tallin aŭ Leningrad. Pluaj informoj per „s-ro Matti Voltti, Tempelikatu 25 B 47, Helsinko 10, Finnlando“.

Germanio. Por la tria fojo aperis „Faktoj pri Germanujo“, bonega informilo kun multe da bildoj kaj statikostoj. Bonfartige tiu broŝuro diferencigas de similitolaj pamfletoj celantaj falsigitan historion. Unuopaj ekzempleroj estas haveblaj ĉe „Inter Naciones, Referat Information, Kennedyallee 91 — 103, D 532 Bad Godesberg, Germanio“.

Germanio. La nordgermana urbo Göttingen eldonis novan plurkoloran faldfolion en Esperanto. Ĝi estas havebla per „Städtisches Fremdenverkehrsamt, Rathaus, 34 Göttingen, Germanio“.


Germanio. Denove aperis la „bestkalendaro“ (30 × 42 cm) kaj unufoje „flotkalendaro (28 × 30 cm) por 1967 kun klarigoj en Esperanto. Tre konvena kaj ŝata donaco por viaj geamikoj en eksterlando. Kostonj: 4,— DM por la pli granda kaj 3,— DM por du malgrandaj kalendaraj. Mendu tuj ĉe: „s-ro Adolf Burkhardt, D-7261 Gechingen, Germanio“.

Norvegio. La Turisttrafika Asocio de Oslo kaj Ĉirkaŭaĵo eldonis por la sesa fojo faldfolion en Esperanto. Ĝi donas ampleksajn informojn kaj taŭgajn konsilojn. Al la partoprenintoj de la 17a IFEF-kongreso ĝi memorigas pri vizito al la norvega ĉefurbo suvoje al Hamar. Kontraŭ unu respondkupono oni povas peti maksimume 12 ekzemplerojn de „Klubo Esperantista, Boks 942, Oslo 1, Norvegio“.

Rumanio. Fervojista kolego serĉas germanajn korespondantojn. Adreso: „S-ro Potrasku Radu, Bulv. Garii de Est 7, Bukarest — 39, Rumanio“.

Svedio. „Bohuslän, suna somerparadizo“ estas la titolo de nova, kolora faldfolio, kiu montras mapon pri la okcidenta parto de Svedio kune kun detalaj informoj. Interesuloj turnu sin al „GÖTEBORGS OCH BOHUS LÄNS TURISTTRAFIKFÖRBUND, Drottningtorget, Göteborg, Svedio“.

Usono. La 6an de oktobro 1966 transdonis delegitaro de UEA kun ĝia prezidanto, prof. d-ro Lapenna (London), memorandon al la Unuigitaj Nacioj. La memorando entenas proponon por solvi la lingvan problemon en la internaciaj rilatoj pere de Esperanto. Germana Esperanto-Asocio prezentis la germanan tekston de la memorando al la federaciaregistraro kaj kulturministerioj. La memorando estos traktata de UN ankoraŭ dum la nuna kunsida periodo.



*Al niaj
membroj
kaj
eksterlandaj
geamikoj
ni deziras
ĝojigan
kristmaskon
kaj
sukcesplenan
Novan Jaron
Germana
Esperanta
Fervojista
Asocio*

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Barnickel, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Druck / presio: Limburger Vereinsdruckerei, 625 Limburg/Lahn. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.